N. N. 17,

# Blovas vent'...

*tradukita de Ernfrid Malmgren*

Blovas vent', post moment'
iros ŝip' al mar'.
Ploretas amikino de l' marist',
malĝojas la ondar'.

Ploru ne, etulin',
viŝu larmojn for,
ĉar mi revenos post mallonga temp'
kun ĝojo en la kor'!

Or' kaj arĝent' el Orient'
estos donac' de mi.
Velur' kaj silko estos en la kest',
kaj ĉion havos vi.

*Traduko de la Sveda poemo "Vinden drar..." de N. N. 17 en Esperanton de* Ernfrid Malmgren *(∗1899-11.03 – †1970-03-28) en 1934.*

*Arg-498-973 (2009-11-25 10:56:58)*

*Pri la tradukinto Ernfrid Malmgren vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Ernfrid_Malmgren`. *La traduko troveblas en la retejo* `http://www.literaturo.dk/blovas.htm`. *Tie estas indikitaj ankaŭ la muzik-notoj. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, Danujo, "lars.kromann@mail.dk") kopiis ĝin el la revuo "Heroldo de Esperanto", Köln, Germanio. N-ro 27 (784), dekkvina jarkolekto, 8-an de julio 1934.*